



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

JANUARO - FEBRUARO

1963

1

KULTURAJ KAJEROJ

1963

Januaro - Februaro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

El la Kulturdomo :

La ĉi-jaraj someraj aktivaĵoj.

Esperanto tra la Mondo.

Iom da scienco :

La Planedoj (S-ro Jarlier).

La aŭtomobilo 75-jara.

El ie en la mondo :

Virinoj el Afriko antaŭeniras (S-ino Potin).

Modernaj strangaĵoj (R. Watier).

Kelkaj gravaj datrevenoj.

Gramatika kulturo :

Prepozicio kaj Konjunkcio (D. Dalmaŭ).

Fantaziaĵo :

Franca specialaĵo (B. Cheverry).

Per via distro :

Nia Konkurso - Ludoj.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

LA ĈI-JARAJ SOMERAJ AKTIVAĴOJ

La Kulturdomo preparis siajn 1963-aktivaĵojn. La detala programo estas jam je la dispono de la interesatoj. Ni denove provis disponigi al la gesamideanoj aron de periodoj sufiĉe diversaj por ke ĉiu trovu tion, kio respondas liajn dezirojn.

Ĉu vi deziras ĉeesti kulturalan periodon? aŭskulti valorajn prelegantojn? lerni pere de Esperanto? vivi dum du semajnoj en vere internacia kaj amika rondo? partopreni en taŭge organizitaj ekskursoj? Nu, elektu la « Kulturajn kaj Turismajn Internaciajn Feriojn (13-27 Julio). Dum tiu periodo S-ino MAJOR el Londono prelegos pri siaj spertoj de Esp. instruistino en Skandinavio kaj de sekretariino en ne-esperantistaj internaciaj kongresoj. S-ino Major multe vojaĝis, konatiĝis kun multaj landoj kaj ŝiaj prelegoj estos certe instruaj kaj plaĉaj. S-ro DE WAARD el Nederlando, jam de longe simpatie konata de la Gresillon-anoj, prezentos « Laborantojn sur interpopola tereno », homojn pli malpli famajn, kies agoj estis ĉiuj samcelaj: la plibonigo de la hom-sorto. S-ino CHEVERRY, Prezidantino de la Esp.-grupo de Angers (apud Baugé), parolos pri la Loire-valo, la regiono iam ŝatata de la francaj reĝoj kaj nun de la turistoj kaj ...de la esperantistoj. S-ro LLECH-WALTER, Prezidanto de la Franca Esp-Unuiĝo prezentos sian regionon, Katalunion, kaj ĝian originalan literaturon, kaj, kun tipe suda parollerteco promonigos nin en diversaj landoj. Ekskursoj veturigos la partoprenantojn al la plej famaj kasteloj kaj ankaŭ al aliaj vidindaĵoj, eĉ, vespere, al la fama spektaklo en la kastelo de Le Lude.

Ĉu vi deziras eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon? Vi povos elekti el kvar diversaj periodoj:

30 JUNIO - 13 JULIO. — Du kursoj okazos por komencantoj kaj progresantoj. Samtempe verŝajne vizitos la kastelon grupoj de ekskursantaj diverslandaj samideanoj.

27 JULIO - 10 AŬGUSTO. — Tre grava periodo por la preparado de la ekzamenoj: la francaj Atesto pri Kapableco kaj Pedagogia Atesto, kaj la tute nova Gresillona Internacia Atesto pri Kapableco. Samtempe okazos kolokvo pri pedagogio, organizita de svisaj instruistoj.

10 AŬGUSTO - 1 SEPTEMBRO. — La nun famaj « Kulturaj Esperantistaj Semajnoj », kun

KIEN MI DEVAS SENDI MIAN ABONON?



Ne plu cerbumu! Rigardu la unuan kovrilpaĝon (franca adreso), aŭ la lastan (niaj perantoj).

tri Esp.-kursoj kaj ankaŭ instruo de bindarto kaj korbĉfarado. Fine de la « Semajnoj » okazos la kutimaj ekzamenoj. Tiu periodo estas ĝenerale multe ŝatata de ĉiuj ne nur pro la aktivaj sed ankaŭ pro la gaja etoso.

1 - 15 SEPTEMBRO. — La tradicia frukto-plena periodo organizita de la Franca Esp-Unuiĝo kun kurso kaj ekzameno.

Kompreneble post la 15-a de Septembro la gesamideanoj, kiuj deziras ripozi povos restadi en la kastelo.

Sajnas al ni, ke almenaŭ unu el tiuj periodoj plaĉos al tiuj, kiuj deziras eklerni Esperanton, progresi en la praktikado de la lingvo, trapasi ekzamenon, ĝui per Esperanto le plezuron de kulturigo, labori, promeni, amuziĝi kun diverslandaj samlingvaj amikoj, viziti agrablegan regionon. Gresillon proponas al vi tiujn eblojn. Anoncu vin tuj, ĉar la spertoj pravas, ke estas preferinde rezervi sian lokon tre frue.

Esperanto tra la Mondo



La Universala Kongreso prepariĝas

— De nun aperas, ke la 48a Universala Kongreso de Sofia (3-10-8) arigos rekordan nombron de kongresanoj.

— Cseh-seminario okazos dum la kongreso (dum 15 horoj en kvin tagoj).

— Postkongresa ekskurso : dum 5 tagoj al Varna (Nigra Maro) kun haltoj en turismaj lokoj.

— Junulara kongreso : en Vraca, ankaŭ en Bulgario, (27-7 - 3-8).

— Oratora Konkurso : Rajtos partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj ; 6 temoj elekteblaj (vidu « Esperanto » de Januaro).

Internacia Konferenco de la lernejoj kun esperanto-kursoj

Internacia konferenco de la lernejoj en kiuj la internacia lingvo estas instruata, okazos la 28-31an de Julio kaj la 1an de aŭgusto en Beograd (Jugoslavio). Adreso de la organiza komitato : Jugoslavia Esperanto-Ligo (por IKL), Terazije 42, Beograd, Pf. 201.

Libreto de UNESKO en esperanto...

Interesa eldonaĵo de UNESKO : « Oriento kaj Okcidento : al reciproka kompreno ? » de Georges Fradier, jam eldonita en diversaj lingvoj, nun aperis ankaŭ en esperanto-traduko, kiel eldonaĵo de U.E.A. finance subvenciita de U.N.E.S.K.O. (50-paĝa ilustrita libreto).

...Kaj verketo de Jean Rostand

« Tio, kion mi kredas », traduko de verko de la fama franca sciencisto Jean Rostand ĵus aperis kun antaŭparolo de la verkisto, granda amiko de esperanto. Havebla ĉe nia Libro-Servo (2 fr. aŭ 6 steloj).

En Ĉinio

Esp-Kurso por geprofesoroj de la Han-lingva fakultato okazas en la Universitato de Pekino.

Historia eldonaĵo

La kompleta « Dia Komedio » de Dante (Infero - Purgatorio - Paradizo) aperas en luksiga esperanto-traduko de Giovanni Peterlongo, kun antaŭparoloj de specialistoj kaj ilustraĵoj de Botticelli ! Tre granda evento. Eldonista firmo : « Edizione SIEL Milano ».

Aliaj novaj libroj

— Konata skota kultura eldonejo Mac Lellan (Glasgow) entreprenas serion de dulingvaj libroj sub konstanta redaktado de William Auld. La unua volumo estos la poemciklo « Ahasvero de

Amo » de Kalocsay, kun paralela verstraduko en angla lingvo de Marjorie Boulton.

— « Heroldo de Esperanto » tre baldaŭ eldonos 4an volumon de la « Fabeloj » de Andersen, en traduko de Zamenhof.

Esperanto kaj la Brazilaj Lernejoj

La brazila Federacia Konsilantaro pri Instruado unuanime decidis, ke Esperanto, estu permesata inter la modernaj lingvoj, kiuj povas esti nedevige instruataj en lernejoj kaj gimnazioj.

Esperanto kiel punta literatura lingvo

Unu el la plej konataj verkoj de la nederlanda verkisto Maurits Dekker, kiu mortis antaŭ ne longe, estas la teatraĵo « La mondo ne havas atendejon ». La teatraĵo estas tradukita ankaŭ en la internacian Lingvon. El la Esperanta eldono la verko atingis i.a. la popolojn de Japanujo kaj Ĉekoslovakio ; eĉ la franca eldono estas tradukita el Esperanto.

Esperanto en Cejlono

Ĵus fondiĝis en la ĉefurbo de Cejlono, Colombo, la Cejlona Esperanto-Societo. Esperantanhala vortareto estas nun presata de la Universitato de Cejlono en 2.000 ekzempleroj.

Finna filologo pledas por esperanto

La nova profesoro de nordlanda filologio de la Universitato de Turku, Finnlando, Pierre Naert, por sia enoficiga prelego, la 12-an de decembro 1962, elektis la temon « Lingvo kaj kulturo ». Per detalaj argumentoj li prezentis la lingvan situacion de la hodiaŭo. Laŭ la opinio de Prof. Naert, nur planlingvo povos solvi la tre urĝan problemon, kaj la sola ebleco tiurilate estas la Internacia lingvo Esperanto.

El Madagaskaro

— Oni informis nin, ke la novaj esperantaj poŝtmarkoj eldonitaj en Madagaskaro estas haveblaj ĉe : Receveur principal des P. et T., service philatelique, Tananarive RP. (5, 8, 10, 15 frankoj CFA — li stelo : 18 fr. CFA). Ne forgesu aldoni int-respondkupuponon.

— La urbestro de Tananarive ĵus decidis baldaŭ inaŭguri « straton Dro Zamenhof ». Gratulojn al la ESp. Asocio en Madagaskaro.

Jugoslavio

Ni ĵus ricevis bele prezentitan ekzemplaron de nova revuo : « Homo kaj Kosmo » eldonita de la Astronomia Observatorio en Zagreb.

IOM DA SCIENCO

LA PLANEDOJ



La planedoj estas migraj astroj, kiuj zigzagas inter steloj sur la ĉiela sfero, tiu sfero, kie lokigas la oraj najloj de la steloj. Ili ne scintilas, kiel la steloj. En lorno la bildo de planedo dikiĝas laŭ la dikiĝo de la lorno, dum la bildo de steleto ĉiam estas punkto.

En antikvaj tempoj la astronomoj konis kvin planedojn : Merkuro, Venuso, Marso, Jupitero, Saturno. Sed ili opiniis, ke la Tero estas la mondo-centro kaj ke steloj, suno, luno, planedoj rondiras ĉirkaŭ la Tero. Estis tre malfacile eksplicki la movadon de tiuj astroj. Nur en la mezo de la XVI-a jarcento, pola astronomo Kopernik, publikigis traktaĵon laŭ kiu la Suno kaj la steloj estas senmovaj. La Tero estas planedo, kiu rondiras ĉirkaŭ la Suno kiel la aliaj planedoj. La Tero turniĝas en unu tago kaj rondiras ĉirkaŭ la Suno en unu jaro. Tiujn ideojn defendis Galileo kaj Kepler. Post multaj jaroj de observado kaj kalkuloj, Kepler havis la originalan ideon pri elipsa trajektorio, laŭ la dua leĝo aŭ leĝo de areoj; ĝis tiam la sola ebla movado estis cirkla kaj unuforma. La tria leĝo difinis la parencecon inter la movadoj de la diversaj planedoj.

La merito de kopernik kaj Kepler estas tre granda ĉar la observadoj estis faritaj sen optika instrumento.

Jen la planedoj de la pli proksima ĝis la pli malproksima rilate al la suno : Merkuro, Venuso, Tero, Marso, etaj planedoj aŭ astroidoj, Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno, Plutono.

MERKURO : estas iom pli dika ol la Luno, satelito de la Tero. La observado de tiu planedo estas malfacila pro ĝia proksimeco al la Suno; oni devas ĝin observi iomete post la sunsubiro aŭ matene antaŭ la sunleviĝo. Ĝi brilas, kiel la plej bela en la ĉielo. Ĝi rondiras en 88 tagoj ĉirkaŭ la suno kaj turniĝas en 88 tagoj, ĉar ĝi prezentas ĉiam la saman flankon al la Suno. Sur la luma flanko la temperaturo atingas pli ol 400° kaj ĝi estas 70° super la absoluta nulo sur la alia flanko. Sed inter la luma kaj la malluma flankoj estas meza zono, kie la vivo estus ebla.

VENUSO : fratina planedo de Tero : sama dikeco, sama densa atmosfero, kiu malebligas vidi la surfacon. Ĝi prezentas fazojn kaj estas la plej bela astro en la ĉielo post la Suno kaj la Luno. Oni nomas ĝin « la matena stelo », « la vespera stelo », « la stelo de la paŝtistoj ». Ĝi rondiras ĉirkaŭ la Suno en 225 tertagoj. La orbito estas preskaŭ cirkla. Ĝia distanco al la Suno estas inter 100 kaj 109 milionoj da kilometroj. Ĝia atmosfero abunde entenas karbonan gason, sen oksigeno kaj akvovaporo super la nubegoj. Pro tio oni ne konas la daŭron de pro-

pra revoluo. La proksimeco de la suno ne tute aremas, kiel por Merkuro, ĝia rivoluadon, kiu estas verŝajne sufiĉe malrapida. La temperaturoj super la nuboj varias inter 60° kaj — 30°; la vivo eblas sur Venuso malgraŭ la manko de oksigeno en la atmosfero, ĉar ekzemple ekzistas sur Tero anaerobiaj bakterioj, kiuj vivas sen aero. Plie, fiŝoj vivas en akvo per sorbata oksigeno, ĉar se tiu gaso ne estas en la atmosfero, eblas ke ĝi estu en oceanoj, lagoj kaj rivcroj.

MARSO : aspektas, kiel bela ruĝeta stelo. Ĝia radio estas la duono de la radio de la Tero kaj la duoblo de la radio de la Luno. Ĝi havas dikecon interan al tiuj de la Tero kaj Luno. Ĝia distanco al la Suno varias inter 207 kaj 250 milionoj da kilometroj. Ĝi alproksimiĝas al Tero ĝis 57 milionoj da kilometroj kaj oni povas ĝin observi kun multaj detalaj. La tago de Marso valoras 24 1/2 horojn de tertago kaj ĝi rondiras ĉirkaŭ la suno en 2 jaroj. Ĝi konas kvar sezonojn duoble pli longajn ol sur Tero kaj pli intensajn ol sur ĝi. Pluraj faktoj permesas diri, ke vivo ekzistas sur Marso. La koloroj estas : blanka ĉirkaŭ la poluso, verdetaj kaj verda, oranĝa laŭ la sezono kaj laŭ la proksimiĝo al ekvatoro. La atmosfero estas tre seka, tre maldensa kaj entenas azoton, karbonan gason, hidrogenon. La gravito estas trioble pli malgranda ol sur Tero. Ĉie estas tre malvarme; la sunradiado estas multe pli malforta. Marso havas du satelitojn, malgrandegajn astroidojn, Phobos kaj Dismos (en greka lingvo, Teruro kaj Paniko).

ETAJ PLANEDOJ AŬ ASTROIDOJ : « Inter Marso kaj Jupitero mi lokas planedon », diris Kepler. En jaro 1778, germana astronomo Bode rimarkis, ke serio de nombroj tiel skribitaj donas la distancojn de planedoj al la Suno, se la distanco Tero-Suno estas la unuo. Ni skribu 0, 3, 6, 12, 24, 48, 96, 192, 384, geometria progresio kun etapa proporcio de 2, antaŭita per 0. Ni aldonu al ĉiu nombro 4 kaj ni dividu per 10 :

0,4	0,7	1	1,6	2,8
Merkuro	Venuso	Tero	Marso	?
5,2	10	19,6	38,8	
Jupitero	Saturno	Urano	Neptuno	

En 1881 Herschel malkovris la planedon Urano je la distanco 19,2 respondanta al plia nombro en la serio de Bode (19,6). La astronomoj serĉis inter Marso kaj Jupitero unu planedon je distanco 2,8, kaj tiel ili malkovris grandan nombron da etaj planedoj. Jen la pli dikaj el tiuj planedoj : Cereso (1801), Pallaso (1802), Junono (1804), Vestao (1807). Oni nun kalkulas pli ol 1.000 el tiuj planedoj.

JUPITERO : estas malpeza giganta planedo, kies radio egalas 71.400 km. Ĝia distanco al Suno varias de 740 ĝis 816 milionoj da kilometroj. La daŭro de ĝia revoluo estas preskaŭ 12 jaroj. Ĝi turniĝas en 9 1/2 horoj. Sen optika instrumento Jupitero aperas, kiel la plej brila el la astroj post Suno, Luno kaj Venuso. Per malgranda lorno estas bela spektaklo kun ĝiaj kvar dikaj satelitoj en rapida ĉirkaŭirado. Jupitero prezentas bendojn paralelajn al la ekvatoro, alterne helajn kaj malhelajn, zonojn el nuboj, kies formo kaj koloro varias. La planedo ne turniĝas, kiel solido. La materio estas semi-likva kaj semi-gasa, sendube gasoj likvigataj de malalta temperaturo (— 175°). La fama ruĝa makulo ŝajnas flosi sur oceanoj el metano kaj amoniako, kaj el tiu ruĝa makulo venas radioelektraj elsendoj. Ĉirkaŭ Jupitero rondiras 12 satelitoj el kiuj kvar estas tre dikaj kaj havas atmosferon. La aliaj estis malkovritaj rekte aŭ per fotografio. La kvar lastaj rondiras en la direkto de horloĝaj montriloj t.e. en direkto inversa al la kutima en astronomio. La eklipso de la dikaj satelitoj estas uzata de maristoj kaj esploristoj por koni la horon de la unua meridiano, do por kalkuli la longitudon de la loko. La observado de la unua satelito de Jupitero permesis al la dano Roemer difini la rapidon de la lumo.

SATURNO : mirindaĵo de la ĉielo, giganta planedo, preskaŭ tiel dika kiel Jupitero, kun siaj, satelitaj ringoj. Ĝia revoluo ĉirkaŭ la Suno daŭras 29 1/2 jarojn je distanco inter 1350 kaj 1509 milionoj da kilometroj. Ĝi turniĝas en iom pli ol 10 horoj, rotacio tre rapida do platiĝo tre granda. Tre simila al Jupitero, Saturno prezentas bendojn paralelajn al ekvatoro, atmosferon densan kaj sendube saman konsiston. Estas mondo, kiu formiĝas el gasoj kondensigantaj sub la efiko de gravito Saturno prezentas unikan apartecon : sistemon de ringoj situantaj en la plano de ĝia ekvatoro. Tiuj ringoj konsistas el partikloj aparte rondirantaj kun sia propra rapido, konforme al la leĝoj de Kepler, sed ne kiel solida krono. La ringoj sufiĉe densaj formas ombbron sur la planedo kaj inverse. La perspektivo de la ringoj varias.

URANO : malkovrita de Herschel en la jaro 1781. Ĝi estas dika planedo, kies radio valoras 23.800 kilometrojn. Ĝi rondiras la Sunon dum 84 jaroj je distanco inter 2740 kaj 3000 milionoj da kilometroj. Ĝi turniĝas en 10 horoj kaj ĝi estas analoga al Jupitero kaj Saturno ĉar oni povis ekvidi paralelajn bendojn kaj konstati platiĝon tre grandan. La temperaturo estas tre malalta : de tiu planedo la Suno aperas tre malgranda disko kaj ĝia radiado estas tre malforta. La rotacia akso kuŝas sur la ekliptika plano kaj la senco estas retroira. Kiel tio okazis? oni ne scias. Kvin satelitoj rondiras ĉirkaŭ tiu planedo en rekta senco kompare kun la planedo sed en retroira senco por ni.

NEPTUNO : malkovrita de la franca astronomo Le Verrier jene : oni konstatis perturbojn en la movado de Urano, la lasta planedo ĝis tiam konata. La kaŭzo estis nek satelito, nek planedo situanta inter Urano kaj Saturno. Estis do planedo migranta en la ekliptika plano. Le Verrier studis tiujn perturbojn por koni mason, distancon, situon en la ĉielo. Post unu jaro li sendis al astronomo Galle

en Berlino, en 1846, la rezulton de siaj kalkuloj. Galle ricevis la leteron la 23-an kaj, vespere, ekvidis la astron je 52' de la situo, kiun indikis Le Verrier. Tiu planedo estas ne videbla sen lorno kaj la observado per lorno estas tre malfacila pro ĝia malproksimeco. Spektranalizo montris, ke Neptuno turniĝas en retroira senco. Ĝi gravitas 30 oble pli malproksime de la Suno ol Tero dum ĉirkaŭ 165 jaroj. Tiel dika, kiel Urano, ĝia konsisto estas analoga al tiu de Jupitero, Saturno kaj Urano. La temperaturo estas certe 200° sub nulo. Ĝi havas du satelitojn, inter kiuj unu estas retroira.

PLUTONO : malkovrita en 1930 per fotografio. Ĝi estas planedo transa de Neptuno. Ĝia distanco al la Suno estas 6300 milionoj da kilometroj. Ĝia revoluo daŭras 248 jarojn. Ĝi estas pli malgranda ol Tero. La temperaturo estas tre malalta, proksima je la absoluta nulo. Oni opinias ke ĝi estas malnova satelito de Neptuno.

Ĉu estas aliaj planedoj pli malproksimaj? Tre malfacile estas tion montri, sed eble respondi jese.
S-ro JARLIER.

La planedoj laŭ la distanco al la suno, kaj kompara dikeco


• Merkuro

• Venuso

• Tero

• Marso

⋮ astroidoj




○ Uranuso

○ Neptuno

• Plutono

La Aŭtomobilo 75-Jara

Hieraŭ



En sia junaĝo la aŭtomobilo estis ĉeval-veturilo sen ĉevalo kun malgranda motoro ĉe la antaŭa aŭ malantaŭa parto. Post la unua mond-milito la graveco de la meĥaniko pli grandiĝis kaj la kapoto plilongiĝis. Ankaŭ la ĉasio plilongiĝis. Samtempe la ventoŝirmilo fariĝis malpli

Hodiaŭ

La unuaj aŭtomobil-fabrikistoj inspiriĝis per la ĝenerala formo de la tiamaj veturiloj. La karoserio-desegnistoj estis jam, kaj ankoraŭ estas artistoj. Ĉiuj aŭtomobiloj multe diferenciĝis laŭ la fabrikistoj. Sed la seria fabrikado ŝanĝis tion. Oni ne plu kutime faras karoseriojn laŭ la gusto de la klientoj. La prezoj malaltiĝis.



Morgaŭ ?



alta, pli horizontala. Poste, en 1934, oni vidis la unuajn aerodinamikajn aŭtomobilojn. La linioj rondiĝis. Antaŭ kelkaj jaroj la ideala formo estis la « pluv-guto ». Nuntempe la Italoj regas sur la aerodinamiko-tereno. Kaj morgaŭ? Via imag-povo elektu !...



EL IE EN LA MONDO

Virinoj el Afriko antaŭeniras !

La 20an de novembro en Dakaro Kolokvo d'Africaninoj malfermiĝis.

La konferenca aŭditorio de la Ministrejo pri eksterlandaj aferoj tuj pleniĝis per eksterordinara homalfluo. Tiu kolokvo vekis grandan intereson, kiun substrekis ĉiuj oratoroj.

La malferman kunsidon prezidis Ministro komisiita de la Ĉefministro.

La mirindaj buntaj tradiciaj kostumoj de la virinoj ravis la spektantojn.

La ĝenerala Sekretariino de la Kolokvo ekparolis dezirante koran bonvenon al la Deleĝitinoj, kiuj alvenis el 23 diversaj Afrikaj landoj, samtempe al la riprezentantoj de Internaciaj organizoj, al la Deleĝitino de U.N.E.S.C.O., al la Senegalia Registaro, kaj aliaj...

Sinjorino Fall kortuŝe akceptis la eksan Direktorinon de la Instruista Seminario en Rufisque, Senegalia : Sinon Le Goff el Nantes, Francio, kiu grandparte kontribuis al l'emancipado de virinoj en Afriko. Oulimata Fall insistis sur la fakto ke « Senegalia ne forĝis tion ! »

Poste, ŝi akcentis la profundan ĝojon kaj fieron pro la elekto de Dakaro, kiel sidejo de la kunveno.

Tiu manifestacio pravas, ke l'edukado, l'emancipado kaj l'enkorpiĝo de virinoj en la vivo ĉu ekonomika, socia aŭ kultura, estas baza faktoro por la rapida kaj harmonia evoluado de la lando. Estas unu el la plej urĝaj celoj de Senegalia.

Vera sendependenco konsistas el la rajto determini la celecon de la propra politiko, decidi kaj elekti pri aliancoj. Ĝi supozas, antaŭ ĉio totalan liberigon de la individuo, kompletan edukadon de la civitanoj.

Al tiu grandskala tasko la virinoj alportas sian pozitivan kontribuon, sen kiu nenio granda, nenio firma, nenio daŭra estos farita.

Ministro parolis pri la landa Konstitucio, kiu sen dubasenco donas al la virinoj la rangon kaj la eblecojn atingi kompletan disflorigon. « La Senegalia Respubliko garantias l'egalecon al ĉiuj civitanoj, sen distingo inter la seksoj ».

Laŭ Fino, Lazarus, Deleĝitino de U.N.E.S.C.O. pli da 50 % el la junulinoj ricevas nenian edukadon. Malpli ol 30 % el tiuj kiuj... studas en lernejoj transpasas la nivelon de la unuagrada instruado, malpli ol 2 % ricevas iun ajn superan edukadon.

« Nia tasko dum tiu-ĉi Konferenco estas la ekzamonado de la diversaj problemoj pri la virina edukado laŭ tri niveloj : analfabetismo kaj ties sekvoj, atingebleco al teknika kaj profesia instruado, edukado kaj preparo al la publika vivo ».

Komprenoble la debatoj okazis dank'al la du oficialaj lingvoj : la franca kaj la angla. Por mi

mem tio ne gravis ĉar mi scipovas ambaŭ lingvojn, tamen la kapaŭdiloj ne ĉiam bone funkciis. Pro tio diskutoj perdis iomete de la dezirinda spontaneco.

Kelkaj el la oratorinoj estis tute rimarkeblaj. Ili parolis kaj demandis pri unuarangaj aferoj koncerne la estontecon de la virino en la socia kaj en la familia vivo ; precipe pri poligamio, edukado de la infanoj, juraj problemoj, edziĝaj paktoj, ktp... Komprenoble la opinioj varias laŭ la religioj, la konstitucioj de la originaj landoj, la toleremo de la registaroj.

Dum la Kolokvo, la Prezidento de la Respubliko, la ĉefministro kaj aliaj oficialaj instancoj invitis la partoprenintojn al bankedoj kaj folkloraj vesperoj.


La kongresantinoj siavice regalis nin per lokaj kuirspecialaĵoj kaj belaj spektakloj de Senegaliaj dancoj.

Sub kokusujoj, en belaj ĝardenoj lumigitaj per buntaj lampoj, la mirigaj kostumoj brilegis per ĉiuj brilajetoj de la longaj puntaj « boubous de fête » (festaj indiĝenaj roboj).

Kion diri pri la juveloj el oro : kol-kaj orelnigoj, brakaj kaj maleolaj braceletoj, ornamitaj pingloj, ktp. La ampleksa kapvesto konsistas el tulo, arte drapirita, kies brila koloro harmonias kun tiu de la robo.

Oni povas konkludi : spite al kelkaj malsuperecoj, la edzinoj bone scias kiel estiĝi la malavarecon de la Afrikaj edzoj !

Sino Paule POTIN.



MODERNAJ STRANGAĴOJ

Mi ne scias, karaj amikoj, ĉu vi ŝatas pacajn okupojn, kiel estas la fiŝkaptado aŭ la kulturado de plantoj. Cetere, ambaŭ estas malfacilaj. Fiŝoj estas kapricemaj kaj la fiŝkaptanto tre pacienca, kiu esperas manĝi belajn arĝentajn fiŝojn, kiujn li eltiros per la fadeno kun hoketo, riskas longe malsati. Same, kiam oni kulturas legomojn, oni povas vane atendi la rikolton. Limakoj kaj helikoj manĝegas la junajn plantojn kaj kio restas suferas pro troa sekeco, provento, hajlo, ktp... Sed, feliĉe, kiel diris nia bona ĉefredaktanto S-ro Babin, venis la scienco kaj la homo ne plu estas devigita manĝi nur kion li kreskigas aŭ kaptas. En la maro oni fiŝkaptas moderne per perfekte ekipitaj ŝipoj. Legomojn kaj tritikon oni kulturas abunde per traktoroj kaj aliaj modernaj iloj. Per venenoj ne danĝeraj por la homo oni venkas la limakojn, la helikojn kaj ĉiujn aliajn manĝemajn aŭ detruemajn insektojn aŭ fungetojn. La progreso alportis la paradizon sur la teron, la homoj povas manĝi plensate... Sed !!!

Jen kion oni povas legi en francaj gazetoj : la afero okazas en Bretonujo — Estas konate ke la Bretonanoj estas simpatiaj homoj, honestaj, bonkoraj, plenaj je kvalitoj sed tamen kun unu malkvalito : la obstineco, alidirite : malmola kapo. Ĉe la norda bordo de Bretonujo la terkulturistoj opinias ke nur du legomoj estas kulturindaj : la terpomo kaj la artiŝoko. Dank'al benita milda klimato ili produktas alterne tiom da terpomoj aŭ tiom da artiŝokoj, ke ne eblas vendi sur la merkato tiom grandegan kvanton de tiuj produktaĵoj. Laŭ la famkonata ekonomio leĝo de la oferkvanto kaj petita kvanto, la prezoj malaltiĝas kaj la terkulturistoj estas tre malkontentaj. Okazas stranga fenomeno : kvankam en Bretonujo la prezoj malaltiĝas tamen en Parizo aŭ en aliaj grandaj urboj la prezoj de terpomoj aŭ artiŝokoj restas preskaŭ senŝanĝaj. Oni eĉ demonstris ke se la produktanto donus senpage siajn produktaĵojn, tamen pro transportkostoj, importoj, revendaj profitoj, ktp, la urbaj prezoj restus ne malaltaj. Kaj tamen la produktantoj bezonas vivi... Sur la suda marbordo de Bretonujo okazas simila afero. Oni multe

fiŝkaptas kaj dank'al Dio kaj al modernaj bone ekipitaj ŝipoj oni kaptas tiom da sardinoj ke, vere la merkato ne povas akcepti il'n ĉiujn. Do, same la prezoj malaltiĝas kaj la fiŝkaptistoj furioziĝas, ribeliĝas, eĉ ŝutas kolere la sardinojn sur la ŝoseon... Kaj tamen por la konsumantoj de grandaj urboj la sardino ne estas tiom mal-kara. Kaj ĉar en grandaj urboj estas multaj laboristoj ne riĉaj, ili ĝenerale havas ĝardeneton kie, kun granda peno ili kulturas legomojn (vidu supren). Sabate aŭ dimanĉe laboristoj forveturas de la granda urbo ĝis ĉarma bordo de rivero, kie ili fiŝkaptas, ĉu jes ! por sin distri, sed ankaŭ kun espero manĝi ion, kio ne kostas. Ĉu vi vidas, kara lenganto, la belan efikon de la tekniko kaj de la scienco ?

Sed ne kedu ke la strangaĵoj estas propraj al Francujo. Ekzemple inter Belgujo kaj Nederlando okazas la dogana buter-milito. Hodiaŭ, dank'al la genio de ekonomiistoj, Eŭropo estas sur triumfanta marĉo. Per planoj, per la supernaciaj institucioj kaj per la Kontrakto de Romo, la ekonomio de almenaŭ ses landoj iras al granda venko. Tamen, tamen en landoj de Benelux okazas stranga afero : la prezoj de la butero ĉiuflanke de la landlimo Nederlando-Belgujo estas danĝere malsamaj. Se oni iras al Nederlandaj vilaĝoj apud la Belga landlimo oni trovas ĉarmajn butikojn, kiuj vendas buteron. Ili havas stokon eble dekfoje pli grandan ol necesas por la tuta vilaĝo ! Venas konstante belgaj aŭtomobilistoj tre aĉetemaj rilate al butero. La Belgaj doganistoj estas ege viglajn, kontrolas kaj kontroladas trairantojn de la landlimo, sed ve ! Kontrabandistoj havas eĉ specialajn aŭtomobilojn kun ujo kaj distribuilo de najlegoj, kiujn oni elŝutas sur la vojon kiam oni estas persekutataj de veturantaj doganistoj. Ĉu ne estas strange, ke du landoj kiuj havas egale bonajn paŝtejojn, egale bonajn bovinojn kaj klimatojn similajn, tamen ne sukcesas produkti buteron por la sama prezo ? Kompatindaj Belgoj kiuj ne povas libere ĝui la Nederlandan produktaĵon !

Pri misteroj de la moderna ekonomio, mi donas alian ekzemplon prenitajn el Itala filmo,

nomita « la fratoj Rocco ». Jen, tre resume, la okazaĵo : Patrino kun kvar filoj forlasas urbon. Ili troviĝas en Milano. Sed la komenco estas tre peniga por sin vivteni, por trovi loĝejon. Oni klarigas al ili, kiel ili povas ricevi senpage loĝejon. La bona urbo Milano ne lasas iun dormi sur la strato ! Sufiĉas havi en la komenco la necesan monon por pagi la unumonatan luprezon en kolektivaj loĝdomoj. Tiamaniere oni eniras kaj vivas trankvile dum unu monato. Poste oni ĉesas pagi. Ĉar oni ne pagas, oni elpelas vin. Ĉar vi estas elpelita la urbo Milano loĝigas vin en specialaj loĝejoj por elpelitoj ! Sed, oni rimarkas, ĉu oni ne povas iri tuj al la dua kategorio ? Oh ne ! estas respondite, ĉar vi devas **unue** esti elpelita !

Inter miaj amikoj, estas unu knabo ne ĉiam tre kuraĝa. Li laboras en fabriko kaj foje la laboro estas teda, enuiga ! Se okaze oni havas malsaneton, bona afero ! Oni iras al la kuracisto kaj oni sin deklaras malsana al la laboroficejo. Pasis unu semajno dum kiu ne estas pagita la salajro. Sed la socia asekuro pagas la kuraciston, la kuracilojn kaj la kompenso por la perdita salajro. Sed la bona fabrik-dunganto opinias, ke la ŝtato estas tro avara kaj li estas fondinta specialan kason por krom-kompenso de la socia ase-

adiciis ĉiuj sumojn kiujn li ricevis de ambaŭ

kura. Kaj mia kamarado, kiu scias bone kalkuli, kaso kaj foje konstatis, ke tiel estas profito sur lia normala samtempa salajro. Ĉu ne bele ? Sed ne ripetu tion ! Oni eĉ flustras, ke ĉe iu tre industria lando (mi ne diros la nomon ĉar mi tro multe riskus) la neĉeestantismo de la laboristaro estas vere granda — pro tro komforta socia asekuro ! Venas la tempo por konkludi mian babiladon. Karaj amikoj en la tuta mondo ! Vi certe konstatis ĉirkaŭ vi aŭ per legado de vialandaj gazetoj, ke ĉio ne estas, kiel diris Kandid de Voltaire « la plej bona en la plej bona mondo ebla ». Ne ! La scienco, la progreso ne ĉiam bone akordiĝas kun la socia ordo, kun la ekonomia regado de la ŝtato, por la feliĉo de la homo. Se vi konstatis tion per **amuzaj ekzemploj**, skribu al mi ! Tio estas enketo — Se hazarde vi ne sufiĉe scipovas Esperanton, aŭ se vi volas sendi eltranspaĝojn de presajoj, sciu, ke mi povas legi krom esperanto la francan, anglan, germanan lingvojn. Ne la lingvo sed la faktoj estas gravaj, ĉar la ĉefa afero estas, ke Esperanto restu ligilo inter homoj por interŝanĝi ideojn en nia tro ŝanĝigema kaj eĉ foje ĥaosa mondo.

R. WATIER.




Quelqaj gravaj datrevenoj



Antaŭ 175 jaroj naskiĝis en Londono,

Lord BYRON. — La verkoj de la poeto de la « tiuepoka malsano » estas movoplenaj. Ankaŭ lia vivo estis tia. Li finverkis siajn plej famajn poemojn en la mediteraneaj landoj kaj en Proksima Oriento. Li mortis en 1824 pro malario en Grekujo, dum la liberiga milito de tiu lando.



Antaŭ 175 jaroj naskiĝis en Danzig,

Arthur SCHOPENHAUER. — Pensulo kaj filozofa li provis elkoni la mond-esencon. Li rigardadis la realan mondon kun profunda pesimismo. Li trovis la eblon eligi el la malĝojega realon dank'al arto kaj filozofio. Lia ĉefa verko estas : « Die Welt als Wille und Vorstellung » (La mondo kiel volo kaj figurado). Li mortis en 1860.



Antaŭ 80 jaroj mortis en Venedig,

Richard WAGNER. — Naskiĝinta en 1813 en Leipzig, tiu komponisto kaj poeto famiĝis pro la nova formo de opero, kiun li kreis : la muzikan dramon. Post agitita vivo kaj vojaĝoj tra tuta Eŭropo, li ricevis la patronadon de la reĝo Ludoviko la Dua, de Bavarujo. Tiu patronado ebligis lin organizi la muzikfestojn en Bayreuth. Liaj plej konataj komponaĵoj estas : La Fantoma ŝipo, Lohengrin, Tristan kaj Isolde, Parsifal, Tannhauser, La Nibelungen, ktp.

Gramatika Kulturo

I. — PREPOZICIO

Sen, kun, de, al, sur, sub,... estas prepozicioj, ĉu ne ?

Jen du frazo kun sama senco, sama semantiko, sed malsama sintakso :

« Sen scii vian nomon, mi ne povas nomi vin ».

« Ne sciante vian nomon, mi ne povas nomi vin ».

Ĉu vi pli ŝatas la unuan aŭ la duan ? Kiun el ili vi konsideras pli korekta ? — Ambaŭ ekzistas ĉe bonaj aŭtoroj, en bonaj verkoj — Sed, kiun vi preferas ? Se vi elektis la duan, mi gratulas vin. Vi havas gramatikan intuicion, aŭ gramatikan kulturon. Zamenhof rekomendis la duan.

Kial, pli korekta estas la dua ? Ĉar, principe, prepozicio estas uzata antaŭ nomo aŭ pronomo, t.e., antaŭ substantivo, por rilatigi ĝin al alia substantivo. Kial, la unua estas ankaŭ akceptebla ?

Ĉar, malstrikte, infinitivo estas verba nomo aŭ pronomo. Strikte, post **sen**, prepozicio, ni devas morfologie substantivigi la infinitivon, kaj diri **sen scio**, kiel en angla : **without knowing** aŭ **without the knowledge**, ne **without know**.

Sed bonvolu ne kredi, ke Zamenhof decidis pri tiu punkto pro influo de la angla lingvo, sed pro la strikta signifo de prepozicio ĝenerale. La angla, kontraŭe, uzas prepozicion por indiki la infinitivon : **to know**, **to do**, malgraŭ la antaŭa ekzemplo por pravi la malon.

Jes, larĝe, ne mallarĝe, komprenu : vi erarus se vi kredus, ke lingvo estas kunmetado de solidoj, ke vortoj estas statikaj, ke lingveroj estas geometriaj ; lingvo estas reflektado de vivo kaj psikologio, de sentado kaj pensado, de homa naturo. Simetrio, ekz-e, ne ekzistas ĉe riĝaj korpoj : ambaŭ miaj okuloj estas diferencaj, kiel inter si diferencas la du viaj, ĉu oreloj, ŝultroj, brakoj, vangoj, genuoj, aŭ kruroj. La granda originaleco de la genia arkitekto Gaudi konsistis en lia malakcepto de la geometrieo ĉe konstruaĵoj : ĉio diferencas en la naturo, ĉu forme, ĉu mezure. Lingvo responda al logiko de aritmetiko aŭ geometrio povus esti ia kodo ; sed vera lingvo povas respondi nur al lingva logiko, al lingvistiko, ne al matematiko. Vivanta lingvo estas funkciado, movado, fluado en kiu, do, semantiko kaj gramatiko estas senlimaj, ĉiuj lingveroj estas elastaj, fluaĵ, kaj tial, malgraŭ ke prepozicio principe postulas post si nomon aŭ pronomon oni ne povas malakcepti la frazon **por manĝi, oni bezonas manĝaĵon** ; sed oni povas preferi **por manĝo, por manĝado, oni bezonas manĝaĵon**.

Jam Aristotelo iel difinis la prepozician kategorion, sed iel konfuze rilate al la konjunkcia. Tra la latina lingvo, la diferenco fariĝis pli klara ; kaj R. Lenz ankoraŭ pli precizigis ĝin. Sed ĉiam nur pli

kaj pli — neniam absolute. Nenio estas absoluta por ni en la mondo krom la mondo.

Kompreneble, multkaze la prepozicioj estas tiel Kategoriaj, kiel en « **sur** » **la tablo estas la libro, kiun mi ricevis « de » Petro kaj sendos « al » Jozefo.**

II. — KONJUNKCIO

Kaj, sed, aŭ, kvankam, ke, se...

La funkcio de konjunkcio konsistas en kunligo de vortoj, propozicioj, frazoj : **kraĵono « kaj » papero ; ĝi ne estas utila, « sed » malutila ; li volas vidi monton « aŭ » maron ; mi malmulte lernas, « kvankam » mi multe studas ; ni pensas, « ke » la mondo mirinde funkcias ; tri « aŭ » kvar samideanoj interparolas en la apuda ĉambro ; « se » pluvos, mi restos hejme, k.c.**

Ni vidas, ke la propozicio **mi restos hejme** dependas de « **se** » **pluvos**, ke la konjunkcio **se** subordigas propozicion ; kaj ke **kraĵono « kaj » papero**, fare de la konjunkcio **kaj** ; kunordigas la propoziciojn, ekz-e **kraĵono (estas utila) « kaj » papero (estas utila)**. Tial oni difinas ke konjunkcio, estas lingvero, kiu kunligas propoziciojn, ĉu kunordige ĉu subordige. Kontraŭe, prepozicio ne kunordigas aŭ subordigas propoziciojn, sed rilatigas nomojn : **pano « kun » butero, vino « en » hotelo, kraĵono « sur » papero**. Atentu kiel oni povas diri **Petro salutas Johanon aŭ Petro salutas al Johano**, ĉar la rilatigo inter P. kaj J. povas esti esprimata per la prepozicio **al**. Sed ni ne povas eviti la akuzativon fare de konjunkcio : **mi pli ofte vidas Petron « ol » Johanon**, ĉar la konjunkcio **ol** nur kunligas la propoziciojn **mi vidas Petron kaj mi vidas Johanon**, sed ne rilatigas ambaŭ nomojn. Jen ankoraŭ pli simple : **mi salutas Petron kaj Johanon** : la konjunkcio **kaj** nun kunordigas la propoziciojn **mi salutas Petron kaj (mi salutas) Johanon**. Sed ĉe misalutas « al » **Johano**, la prepozicio **al** esprimas rilaton inter Petro aŭ Johano kaj mi.

Tamen, foje proksimiĝas la funkcioj de prepozicio kaj konjunkcio ĝis identigo aŭ konfuzigo : **krom li, mi vidis neniun — krom lin, mi vidis neniun ; mi diros al vi nenion alian krom plej pura vero — mi diros al vi nenion alian krom plej puran aeron**. Ĉu tiu **krom** funkcias prefecio aŭ konjunkcio ? **Mi pritraktas gramatikon prefere al io alia — mi salutas « al » Johano**, la prepozicio **al** esprimas ne semantike samas **prefere al kaj prefere ol**, la prepozicio kaj la konjunkcio ?

Oni fine devas kompreni, ke lingvo estas funkciado, fluado, flugado. Tial la lingveroj apartenas al tiu kategorio aŭ al alia — aŭ ili estas interkategoriaj !

Membro de la Akademio de Esperanto.
Delfi DALMAŬ,

FANTAZIAĴO

FRANCA SPECIALAĴO

Ĉu vino, blanka aŭ ruĝa? Ĉu modo aŭ parfumo? tute Ne! Temas pri paro aŭ geo. Stangaĵo! Kial franca specialaĵo?

Karaj gelegantoj, ne mi francino asertas tion, sed alilanda amiko, kiu, iam, diris al mi: « Kiam, ni, eksterlandanoj, la unuan fojon vizitas Francion, tuj okulfrapas nin la konstantecon, la paradon de la francaj geviroj. »

Jes, paron laŭ franca maniero, oni renkontas en neniu alia loko. Kompreneble ankaŭ aliaj landoj entenas geojn diversajn, junajn kaj maljunajn. Tamen pro tradicioj, moroj, religioj aŭ kutimoj la seksoj ne miksas siajn vivojn, kiel ĉe vi. Aliloke, nevidebla muro apartigas virojn kaj inojn. Aŭtomobile, iru en Romo aŭ Madrido. Haltu antaŭ kinejo. Vi ne povos ne rimarki, ke sinjoroj kaj sinjorinoj eliras aparte, solaj aŭ grupe, sed aparte kvazaŭ leĝ-devigataj. Male, en Francio, la publiko eliras el spektaklejo duope, kaj ĉiam la samajn geojn oni renkontas sur la stratoj, la plaĝoj aŭ en restoracioj. En Katalunio, kiel en Lombardio, en Andaluzio kiel en Toskanio, stratoj kaj precipe trinkejoj restas vir-terenoj; edzina kampo komenĉiĝas nur ĉe la hejma pordo? Oni diras, ke tie la roloj ŝanĝiĝas... mi ne malfermu la pordojn!

« Sed », mi kontraŭdiris mian vojaĝeman interparolanto, « en aliaj landoj ekzemple en Norda Eŭropo, kie la virina emancipado estas efektiva ne nur laŭ la leĝo sed ankaŭ pro la enlandaj moroj, ĉu tia eksterdoma partiĝo ekzistas? »

« Jes; tute vane oni serĉus en Svedio, Germanio aŭ Britio, en Usono mem, parojn similiajn al tiuj renkontataj sur francaj stratoj. Ekzemple, en Skandinavio, kie — el ĉiuj vidpunktoj — virinoj egalas virojn, kie edzinoj ĝuas grandan sendependecon, paro estas asocio kreita por determinaj celoj, sed el samegaleco inter la geedzoj ne devige rezultas interesiĝo pri la samaj problemoj, kaj eĉ

se ili havas la samajn emojn, la geoj ne diskutas pri tio publike.

« Generale dum siaj liberaj horoj, la viroj renkontiĝas por paroli pri sportoj, politiko, filozofio... aŭ por trinki. En tiaj rondoj la virinoj ne partoprenas. Ili havas siajn! Sama disdivido ekzistas en Britio kaj Germanio.

« En Usono, la superaŭtoritateco de la virinoj ne ebligas paron laŭ la franca tipo. Inverse de tio, kio okazas en Hispanio kaj Italio, oni plej ofte vidas grupojn de virinoj, kiuj pridiskutas aferojn juĝataj tro gravaj, por ke oni petu la virajn opiniojn ».

« Resume » aldiris mia galanta amiko, « Francio estas la nura lando, kiu sukcesis kunigi virojn kaj inojn okaze de ĉiuj momentoj en la vivo. Sendube, tio rezultas de fleksiĝemeco, malsevereco de la franca virino, kiu sciis adapti siajn pens — kaj viv — manierojn al tiuj de la alia sekso por plej bone kunligi lin al ŝi. »

— « Do, ni estus konkerintaj virojn, laŭ vi? Sed, ĉu al tia edukado ne respondas ŝanĝoj en la vira karaktero? Ĉu la propra naturo de la francoj, finfine deviis? Jen la demando ».

Eble mia amiko troigis. Sed mi ŝatus ricevi viajn opiniojn, karaj gelegantoj!

B. CHEVERRY.



POR VIA DISTRO


NIA KONKURSO

Legu la regularon en la numero de Septembro-Oktobro, kaj sendu viajn respondojn antaŭ la 31a de Marto 1963 al :

S-ro P. CHEVALIER
19, boulevard G.-Lauriol
Nantes (L.-A.) Francujo

I. — UNUA PROBLEMO :

Kruc-vortenigmo : 10 poentoj



Horizontale. — 1. Fluanta akvo ; Tagparto. — 4. Altega Konstruaĵo ; Kaŭza prepozicio ; Koloro. — 5. Sakluda figureto. — 7. Lampsimila frukto ; Rapidege iri. — 9. Vivofino. — 10. Konifera arbo ; malfalsa. — 11. Fluidajmezuro. — 13. Publika sciigo ; teatra ludisto.

Vertikale. — 1. Elefanta nazo ; koloro. — 3. Travidebla materialo ; Dupieda besto. — 4. Valorega metalo. — 5. Mallonga nomo de la brazila ĉefurbo. — 6. Prepozicio ; simiego. — 7. Nia planedo. — 8. Persona pronomo nedifinita ; ĉiama. — 9. Unu-

punkta ludkarto. — 10. Senprokraste. — 11. Vira nomo ; produkto de la spirito. — 13. Marego ; Malplafono.

—o—o—o—

II. — DUA PROBLEMO :

Bonvolu anstataŭigi la punktojn en la ĉisuba teksto per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulataj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, kaj estos forprenita po 1 poento por ĉiu vorto malĝuste aldonita.

(Rimarku : la nombro de la poentoj tute ne montras la nombron de la literoj.)

—o—o—o—

SKANDINAVA KARAKTERO

(laŭ Skandinava verkisto)

W. BREINHOLST

Natura karaktertraĵto de la Skandinavo estas gentileco. Ili lasas la sinjorinojn iri la tramojn, se temas pri junaj sinjorinoj graciaj kruroj kaj jupoj. Ili volonte transdonas sidlokon en la trajnoj maljuna virino, se ili laciĝis en la sidado kaj cetere devas elvagoniĝi la sekva stacio. Plej klare aperas la skandinava komplezemo, kiam du personoj devas dividi kukon.emas atendi la elekton de la alia, esperante, ke tiu, kiu elektos unua, prenos la pli malgrandan parton.

—o—o—o—

AMUJAJ PROBLEMOJ


Solve de la problemo « Paradoxo » : Estu « c » la diferenco inter du ajnaj nombroj ; $a + b = c$. Ni multiplikas la du nombrojn per $a - b$: $(a - b)2 = c(a - b)$; $a^2 - 2ab + b^2 = ac - bc$; $a^2 - ab - ac = ab - bc - b^2$; $a(a - b - c) = b(a - b - c)$. Ni dividas la du membrojn per $(a - b - c)$; ni ricevas : $a = b$. Ĉar la du nombrojn estas ajnaj, ĉiuj nombroj estas egalaj.

Ekspliko : Oni ne povas dividi la du nombrojn per « $a - b - c$ », kiu egalas 0 ; $a - b = c$; $a - b - c = 0$.

—o—o—o—


MANKAS KELKAJ HAROJ !

La frizisto kulpas. Sed ĉi tie ne temas pri lia kulpo ! Vi trovu 8 diferencojn inter tiuj du bildoj.




BONHUMORO

Cu cïo iras glate ?



Cu vi vere aũskultas min ?



Li estas la meteorologo !



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18 (50 fcs).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul Petefij eva 27, ZRENJANIN (300 din).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM SÖ, Postgiro : 157007.

Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okecidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo